

INTERKOMUNIO

La artikolo sub tiu ĉi titolo aperis en la gazeto Vojo - Vero - Vivo de Internacia Katolika Informejo n-ro 1/1971 aperanta tiam en Nederlando, kiel reago al la Sankta Meso okazinta kadre de la Ekumena E-Kongreso 1970 en Klagenfurt, Aŭstrio. Ĉar la problemoj de la interkomunio estas plu aktuala, por klarigi kaŭzon de la problemoj, ni publikigas tiun ĉi artikolon.

Temas pri sankta afero!

Per la Sankta Meso estas konfidentaj al ni la veraj kaj plej sanktaj Korpo kaj Sango de nia Sinjoro Jesuo Kristo, pro tio ke la Meso estas la ĉiam renovigata Ofero de nia Savinto.

En la Sankta Komunio ni ricevas tiujn plej sanktajn Korpon kaj Sangon, la tutan Kriston. Kiel nia Dio, Li estas tie adorinda kaj adorenda!

Tial laŭ kristana kutimo ni ripetas antaŭ la Sankta Hostio post la konsekro la vortojn de la apostolo Tomo: „Mia Sinjoro kaj mia Dio” (Joh 20,28).

Tiel ni preĝas, ĉar tiel ni kredas! Tiel ni kredas, ĉar tiel estas!

Jen la fundamento de nia adorado.

Pro tio, ke en la orientaj ortodoksaj eklezioj regas la sama kredo, agas veraj sacerdotoj, konsekrate dum S. Meso, tial ankaŭ ni tie adoras en la S. Eŭkaristio la saman sanktan Misteron de Dio. Same tie Jesuo Kristo, fariĝinte homo, mortinta kaj resurektinta, laŭ la Korpo kaj Sango ĉeestas en la S. Meso.

En la Vespermanĝo de la protestantaj kristanoj tio ne okazas. La protestantaj pastroj ne estas sacerdotoj; ili ne konsekras kaj ankaŭ ne intencas fari tion!

Jes, ili deziras kunveni memorigante la sanktan Vespermanĝon de nia komuna Sinjoro. Certe ili sincere deziras soleni la sanktan ĉeeston de nia Savanto; sed ne okazas la ofero de Kristo. Ne okazas ŝanĝiĝo de pano kaj vino, nek ili fariĝas en konsekro Korpo kaj Sango de nia Sinjoro.

Pano kaj vino en la protestanta Vespermanĝo restas pano kaj vino. Tiuj estas uzataj en la liturgio nur por esprimi tion, kio okazis en la sankta Vespermanĝo. Tiel la partopre-

nantoj spirite sin unuigas kun Kristo.

Jen la granda, esenca diferenco inter la katolika kaj la protestanta liturgioj.

Se ni ekumene kontaktas kun aliaj kristanoj, ni volas esprimi nian sinceran respekton antaŭ ilia kredo kaj ilia liturgio, same kiel ni agnoskas, ke ili sincere respektas nian kredon kaj nian liturgion.

Vere ni ambaŭ deziras fariĝi tute unu komunio, unu eklezio, unu kristanismo. Kristo mem tion deziras multe pli. Por tio Li akceptis eĉ la morton.

Sekve nia deziro al interkomunio: ne nur al komuna ĉeesto en la S. Meso, sed al vere komuna partopreno en la S. Meso kaj en tiu al komuna partopreno en la S. Komunio.

Por tio tamen ne sufiĉas nia deziro kaj niaj preĝoj!

Por tiu partopreno en la S. Meso kaj por komuna ricevo de la S. Komunio unualoke necesas unueco en la kredo!

Nur kredante oni ja povas adori la Sanktan Sakramenton.

Ĉu estas signo de nia respekto antaŭ aliaj kristanoj, se ni proponas al ili adori kiel veran Dion tion, kio laŭ ilia kredo estas nur pano kaj vino? Tio estus ŝajna ekumeno! Ĉu ni povas proponi, ke ili ricevu la S. Komunio, kaj ili faras tion, akceptante, ke ĝi estas nur la pano kaj la vino?

Jen do la tragika diseco inter ni ambaŭ: ni kontraŭe kredas. Sendepende de nia kaj ilia kredo ni scias, ke fariĝas en la konsekro kaj restas en la tabernaklo la vere sankta Korpo de Kristo!

Tial laŭ propra, persona konvinko iu protestanta kristano povus partopreni en nia S. Meso kaj ricevi la S. Komunio agnoskante la katolikan kredon pri tiu Mistero!

Tiel en dukonfesia nupta soleno kun la

katolika nuptanto same la kristana nuptanto povas, se li deziras tion, komunii, se li per tio agnoskas sian komunan kredon!

Same la katoliko povus eble foje inviti sian kristanan fraton al tiu partopreno kaj al tiu ricevo, nome supoze, ke tiu pretas konfesi sian kredon en tiu Mistero!

Nia invito ja ne estas vere amika kristana

gesto, se ni devas supozi, ke nia protestanta amiko ne tiele kredas, sed kontraŭe tion opinias neakceptebla!

Certe tragika diseco!

Sed evitende estas, ke ni faru kvazaŭ tiu diseco ne estus reala. Tio povus detrui ilian kaj nian konvinkojn! Kaj ĝuste tio estas la plej kontraŭekumena agado! ■